

Monato, Donald BROADRIBB: VIDDISKOJ Originala DVD-filmo tre spektinda Paul Gubbins, kiu direktis ĉi tiun filmon, diras ke, verŝajne, ĝi estas la unua originala dramo publikigita en Esperanto, en 1905; tamen ne eblas certeco pri tio. Diversaj dokumentoj el la frua periodo de Esperanto listigas aron da dramistoj kaj da drametoj, pri kiuj nuntempe oni ne plu povas akiri detalojn. Do, li diras, ne pro historia valoro oni spektu la drameton nun, sed pro ĝiaj ĉarmo kaj teatra/filma karaktero. Temas pri monologo, sed neniel senmoveca monologo. Kun nula buĝeto! La aktoro estas Colin Simmonds, pri kiu mi scias nur, ke li estas elstare profesikvalita aktoro. La filmado estas eksperte farita de Jill Gubbins. Oni filmis en la ĝardenoj de Wedgwood Memorial College, Barlastono, Anglio. Pli belan scenejon oni malfacile trovas. Kaj, kvankam en komentoj pri la filmado estas menciite, ke dum iom da tempo dum la filmado minacis pluvi, kaj sonis la pasado de trajnoj, tiujn sonojn la spektanto ne ĝenate aŭdas, kaj la ne-ĉiam-sunbrila vetero strange kongruas kun la enhavo. La filmo estas komedieto kun intrigo iom bizara, sed ne komplika. Viro enamiĝas al vidvino, sed ŝi postulas, ke li aspektu kiel ŝia iama edzo, antaŭ ol ŝi konsentos edzigi lin. Plejparte tio estis facile farita. Sed la mortinta edzo konstante portis monoklon antaŭ la okulo, kaj nia heroo devas penegi kaj provadi multfoje por sukcesi pri ĉeokuligo de la monoklo. Fine li sukcesas, kaj sekve li kaj la amata vidvino amoplene ĉirkaŭbrakas unu la alian. La vorto „duonokulvitro” estas stranga. Unue mi supozis, ke temas pri duono de monoklo, sed, prave-neprave, la skipo de la filmo interpretis ĝin kiel tutan monoklon. Laŭ la filmmenuo, ekzistas eblo vidi ankaŭ esperantlingvajn subtitolojn, verŝajne por la okazo, se eventuale spektanto ne rekonas la prononciĝon de vorto(j). Sed kiam per la DVD-ludilo en mia komputilo mi klakis sur „subtitoloj”, nenio okazis¹. Nu, ne vere gravas; la prononcado de la aktoro estas glata, klara, nemiskomprenebla, tamen samtempe flua. Kaj se oni volas kontroli la detalojn, aŭ la ĝustecon, de la parolita dialogo, oni povas legi ĝin en la komputilo. Tiel eblas trovi ankaŭ kelkajn ekzercojn, por la okazo, se oni volas uzi ĝin en klasĉambro. Ensume, mi multe ĝuis spekti ĉi filmon kaj rekomendas ĝin al ĉiu, kiu volas plezurplene ĝui farseton. Donald BROADRIBB Aŭgusto Baissac: La duonokulvitro. Eldonis Esperanto-Asocio de Britio, Barlaston, 2005. Vidfilmo (DVD) 14-minuta. Prezo ĉe FEL: 12,00 eŭroj + aŭfranko. 1. Almenaŭ per eŭropaj viddiskaparatoj la subtitoloj estas normale videblaj (pp). Por